

## Veterprognozo popola

La vivon de vilaĝo influas grave la naturaj cirkonstancoj, geografiaj kondiĉoj kaj la vetero. La vilaĝanoj observis jam ekde jarcentoj la konduton de bestoj, movadon de la suno, luno kaj steloj. La multcentjara observado montras rilaton inter la naturaj eventoj, bestokondutoj kaj la vetero koncerne la aktualan datotagon. Tiel elformiĝis loka, regiona scio veteroprognosi, kio influas, direktas iliajn ĉiutagajn agadojn. Tiuj konoj herediĝis al idoj kaj kontraŭ la nun jam ekzistanta sciencbaza veterprognozado, eĉ hodiaŭ estas konataj en kurtaj sentencofrazoj.

La sekvantaj sentencoj veterprognozaj estis kolektitaj en la hungargenta vilaĝo Csíkszentdomokos (Transilvanio).

Kolektis: SZŐCS Matild instruistino, en la jaro 1996.

Rakontis: SZÉKELY Lajos, SZÉKELY Irma, KEDVES Juliánna, BÓJTE Márton.

Esperantigis: KRISTÁLY Tibor

### 1., Bestokondutoj

- Se la koko kokerikas posttagmeze, la vetero ŝanĝiĝos, vintre neĝos, somere pluvos.
- Se la kokoj kokerikas ĉirkaŭ je la 23-a horo, verŝajne la vetero ne ŝanĝiĝos.
- Se la koko kokerikas aŭrore ĉirkaŭ 3-4 horoj, bona vetero venos.
- Se la kokinoj frue iras en la stalon proksimiĝe al vespero, morgaŭ estos vetero bona, se ili eniras malfrue, tiam malbona.
- Se la kokinoj banas en polvo, tiam pluvos.
- Aŭtune se la kokinoj malvestiĝas (forigas la pulmaron grandparte) desur sia korpo tuta, vintro grava venos.
- Aŭtune se la kokinoj komencis la malvestiĝon ĉe la vosto, la vintro alvenos frue kaj estos tre malvarma.
- Aŭtune se la kokinoj komencis la malvestiĝon ĉe la kolo, la vintro malfruos.

- Se la anseroj iras al montosupro gake, pluvo venos.
- Se la meleagroj aŭ la junaj kortbirdoj desaltos anstataŭ irado de sur sia loko, vetero malbona venos kaj pluvos.
- Se la paseroj pepis, aŭ banas en polvo, pluvo estos.
- Se la pigoj grakas, somere pluvos, vintre neĝos.
- Somere se la birdoj kantas frumatene, vetero bona estos.
- Somere se la hirundoj kolektiĝas dumtage sur elektrodraton, venonttage malbona vetero estos.
- Se la hirundoj flugas malalte, proksime al la tero, vetero malbona estos, se ili flugas alten, tiam bona.
- Se la cikonioj klakas, pluvos.
- Vintre, se pasero flugas sur fenestron, aŭ enflugas la domon tra la malfermita pordo, tio signas malvarmon, do ĝi serĉas lokon ŝirmatan.
- Se la frugilegoj flugas sur ĉielo en grupo kaj tie tiuj grakas, pluvo venas.
- Somere se la frugilegoj flugas frumatene supren al la arbaro, la vetero estos konvena por kolekti fojnon, se tiuj flugas malsupren al la vilaĝo, tiam venas vetero malbona.
- Se la frugilegoj grakas vespere aŭ kiam la vespero proksimiĝas, venonttage nuboplena vetero estos, do somere pluvos, vintre neĝos.
- Vintre se la pigoj kaj frugilegoj bivakas sur la montoj, la vetero estos milda.
- Se vintre la paruo flugadas ĉirkaŭ fenestro, estos tre malvarma vetero.
- Se la birdoj arbaraj flugas vintre inter domojn, malvarmo venas kaj la vintro daŭros longe.
- Se la garolo flugas somere en la vilaĝon, oni kalkulu je vetero malvarmeta.

- Se la kukolo eksonas, printempo proksimiĝas.
- Se la turdo eksonas je la fino de Februaro aŭ je la komenco de Marto, la printempo jam alvenis.
- Se la turdo eksonas en lumego (loko sunradiata), la printempo malbona alvenos malfrue, se ĝi eksonas en ombro (kien suno ne lumas), oni povas kalkuli je bona printempo.
- Se la kurlo tion pepetas, „toĉ-toĉ”, tiam tre multfoje estos pluvo dum la somero.
- Se la turtoj enflugas somere sur la arbojn kaj rukulas, pluvo estos.
- Aŭtune se la anseroj kamparaj flugas en V formacio, la vintro jam proksimiĝas.
- Somere se la muŝoj, kuloj tre intense flugadas, pluvos.
- Se la kato lavas sin sur la sojlo rigarde internen, oni kalkulu kun pluvo.
- Se la kato kaŝiĝas sub la tablon por lavi sin, morgaŭ pluvos.
- Aŭtune se la ŝafoj kapduelas (kunfrapas la kapojn), vetero malvarma venas kun pluvo.
- Se la ŝafoj kaj ŝafidoj saltadas, la vetero ŝanĝiĝos malbona, estos malvarma kaj neĝos.
- Se la porko portas la kuŝpajlaĵon (en la buŝo pajlon, sekan herbon por kuŝejo), sur la neĝmontaro estos vetero malvarma kun pluvo.
- Se la ranoj kvakas vespere, vetero malbona venas kun pluvo.
- Se la rano grimpas supren, estos seka, se malsupren malseka (pluvos) vetero.
- Se la ranoj kvakas en lago aŭ flako, ili antaŭsignas pluvon.
- Se la azeno blekas, pluvo venas.

## 2., Naturaj eventoj, situacio de la suno, luno kaj la steloj

- Post kiam la suno leviĝas kaj la ŝtonoj (montorokoj proksimaj) brilas, bona vetero estos.
- Se la suno subirante relumas, morgaŭ bona vetero estos.
- Se ĉirkaŭ la suno estas ringo, pluvo venas.
- Se la suno subiras en nuboj, pluvo venas.
- Se post la sunsubiro estas ruĝa la malsupra parto de la ĉielo, morgaŭ verŝajne pluvos.
- Se la suno subiras sen makulo, verŝajne vetero bona estos.
- Se post pluvo la suno rebrilas, morgaŭ bona vetero estos.
- Se la luno videblas vertikala, verŝajne pluvo, neĝo estos (elfluos el tiu).
- Se la nova luno videblas oblikva sur dorso (la dorso estas malsupre), seka vetero estos ĝis la plena luno, sed se ne tiel videblas, tiam pluvos.
- Se la du pintoj de la luno direktiĝas malsupren, pluvo venas (elfluas el tiu).
- Se la luno havas „korton“ (ĉirkaŭ ĝi estas ringo blanka), en tiu monato verŝajne pluvo, neĝo estos multfoje.
- Se la firmamento havas ĉielarkon, verŝajne vento kaj pluvego estos.
- Se sur la ĉielo nokte estas multaj steloj grandmezuraj, venontage estos: vintre tre malvarma, somere tre varma vetero.
- Se la nokto vintra estas nuboplena, morgaŭ milda vetero estos.
- Se post pluvo kreiĝas ĉielarko, post tri tagoj bona vetero estos (tiu suĉas la akvon).
- Se la ĉielo ruĝas oriente, animkaresa vetero estos.

- Se la ĉielo ruĝas okcidente, vento estos.
- Se sur la firmamento estas cirusoj kaj ankaŭ ĉielarko videblas, pluvo venas.
- Se la malsupra parto de la ĉielo estas ruĝa, morgaŭ estos: somere bona vetero, vintre vento.
- Se proksime al vespero la malsupra parto de la ĉielo estas ruĝa kaj la suno relumas, venontage bona vetero estos.
- Se dum pluvo kreiĝas bubloj grandaj, certe pluvados longe.
- Se post pluvo la suno rebrilas, venontage bona vetero estos.
- Se post pluvo estas du ĉielarkoj, tiam multon pluvos, se nur unu videblas tre supre kaj maldika, en tiu okazo seka vetero venos.
- Se la vento miksas la polvon, la vetero ŝanĝiĝos.
- Se ventas de nordo, tio signifas malvarmetan veteron sen pluvo.
- Se ventas de sudo, la vetero mildiĝas, venos bona periodo.
- Se ventas de oriento, tio signifas tempeston.
- Se ventas de okcidento, bona vetero venos.
- Se la nuboj estas ruĝaj, verŝajne ventos.
- Se estas turnovento, seka vetero estos.
- Se la nuboj flugas al Moldovo, bona vetero estos. Se venas el tiu direkto nuboj, tiam oni diras, ke tiuj portas pluvon.
- Ĝis kiam la nuboj flugas al oriento, ĝis tiam ne estos bona vetero.
- Se super la monto „Feketerez” ekaperas nubo el la direkto „Gyergyó” (djerdjo), ne atendu bonan veteron. Pluvos.
- Se la monton „Garados” (garadoŝ) nebulo ĉirkaŭas, pluvo venas.

- Se de la fonto de rivero „Olt” la nebulo venas sur la ŝtonoj malsupren, pluvos dum tri tagoj, se tiu iras al alia direkto supren, heliĝos, bona vetero estos. Sed se la nuboj disfluas tie supre, ne estos vetero bona.
- Se la nebulo disiĝas, bona vetero venos, se ne, en tiu okazo pluvos.
- Se la fumo flugas rekte supren el la fumtubo, bona vetero estos, se tiu malsupren disiĝas, malbona venos.

### **3., Spertoj rilatantaj al tagoj kaj sezonoj de jaro**

- Se Epifanio estas malseka, vetero konvena estos por abunda rikolto.
- Se dum la tago de Epifanio la suno radias sur la kaposupron de la pastro, tiam ankoraŭ frostoj grava venos.
- Se frostas en la tago de *Piroska* (Piroška, 18-a de januaro), tio daŭriĝos ĝis kvardek tagoj, malbona printempo estos.
- Se la suno brilas dum la tago de Vincento (22-a de januaro), la kelo pleniĝos kun vino.
- Se Paŭlo (25-a de januaro) pasas kun nebulo, homoj mortos pro epidemio.
- Se en la tago Kandelfesto (2-a de februaro) la defluilo gutas ankaŭ en ombro, la nutraĵrestaĵon (kiun lasas la bestoj post manĝado) ne forĵetu, ĉar la printempo malfruos.
- Se en la tago Kandelfesto la urso elvenis el la groto kaj vidas degeli la neĝon, ĝi reiras, ĉar la vintrofino estas ankoraŭ malproksime.
- Se Dorotea (6-a de februaro) degeligas, Juliana (16-a de februaro) frostigas kaj inverse.
- Se la piedoj de Petro kaj Gregoro (12-a de marto) glitas sur glacio, peltaĵon tenu plu la ŝultro.

- Se en la tago de Matiaso (24-a de februaro) ne estas glacio, li frostigas, se tiam glacias en tiu okazo li degeligas.
- Se en la tago de Sankta Gregoro ekfrostas, tio restos ĝis ses semajnoj.
- Se en la tago de Sankta Jozefo (19-a de marto) estas frostoj, tio plutenas sin dum ses semajnoj.
- Se en la tago de Sankta Georgo (24-a de aprilo) pluvas, herbo kreskos eĉ sur la roko.
- Kiom da tagoj antaŭ de Sankta Georgo tondras, poste tiom da tagoj, resp. semajnoj neĝos. Sur la montoj certe.
- Kia la vetero estas en la tago de Karnavalmardo, tia estos je pasko.
- Se la suno leviĝas brilante en la unua tago de majo, seka somero estos.
- Se en la unua tago de majo eĉ se nur du gutojn pluvas, purigu ankaŭ la rokon, ĉar ankaŭ sur tio herbo kreskos.
- Se en majo ne pluvas, venos seka somero, herbo ne kreskos; se la vetero tempestas, tondras, herbo abundiĝos.
- Se inter unua de majo kaj Pentekosto ne pluvas, la ora plugilo ne valoras eĉ unu hordeopaneton.
- Se en la tago de Ĉieliro (16-a de majo) pluvas, multo da fojno foriĝos. Nome, se multfoje pluvas, tial la fojno putriĝas.
- Se en la tago de Ĉiopovo (16-a de junio) la vetero estas intensa, la rikolto estos abunda.
- Se en la tago de Medardo (8-a de junio) pluvas, verŝajne pluvos plu kvardek tagojn.
- Se en la tago de Margareta (10-a de junio) pluvas (pisas sin), pluvos plu ses semajnoj.
- Se en la tagoj de Sankta Antonio (5-a de julio), Sankta Eliaso (20-a de julio), Sankta Ana (26-a de julio) tondras, venos vetero grava.

- Se la tago de Eliaso tondras, la avelo ne havos internaĵon.
- Se en la tago de Sankta Ana pluvas, tio restos ĝis ses semajnoj.
- Se en la tago de Sankta Stefano (20-a de aŭgusto) pluvas, plugilo sekan teron formos, respektive seka aŭtuno venos.
- Je kioma tago tondras post Sankta Stefano, je tiom da tago pli frue ekneĝos antaŭ Sankta Marteno (11-a de novembro).
- Kontraŭ tio, ke frue ekneĝas, post Sankta Marteno varma vetero estos (brilas suno). Tiu periodo estas la somero de oldulinoj.
- Se Sankta Miĥaelo (29-a de septembro) alvenas per „blanka ĉevalo” (neĝas), la vintro frue komenciĝos.
- Se Katerina (25-an de novembro) frostas, Andreo (30-a de novembro) degelas.
- Se Katerina frostas, Kristnasko degelas kaj inverze.
- Se en la tago de Katerina la anseroj paŝadas en neĝo, je Kristnasko en koto kaj inverse.
- Se Sankta Andreo portas blankan ĉemizon (estas neĝo), je Kristnasko nigran (estos koto).
- Se la komenco de decembro estas malvarma, post la tago de Luĉia (13-a decembro) la vetero mildiĝos.
- Kiom granda estas la neĝo antaŭ Kristnasko, tiom granda estos la postherbo venontjara.
- Se je Kristnasko la ŝoseo estas nigra (kota), je Pasko estos blanka.
- Se Kristnasko estas kunĉara, la Pasko kunsleda.
- Se dum nokto de Kristnasko videblas steloj, en la jaro venonta estos bona plimultiĝo de kortbestoj.
- Ju pli malvarma estas la vintro, des pli varma estos la somero.



- Se en oktobro la arbofolioj frue faliĝas, venos vintro pluvoplena, sed se nur kelkaj faliĝas, verŝajne milda vintro estos.
- Se en aŭtuno la folioj restas sur arboj, la printempo malbona estos.
- Se vintre ĉielarko ekaperas okcidente, tio antaŭsignas pluan vintron intensan.
- Se vintre tondras, ĝi daŭriĝos longe kaj estos frostoplena.

#### **4., Ceteraj**

- Se la tintado de sonorilego aŭdiĝas klare, bona vetero estos.
- Se la sonoriltintado de la najbara vilaĝo *Szenttamás* (Sankta Tomaso) aŭdiĝas bone, la vetero ŝanĝiĝos: se nun bona, fariĝos malbona kaj inverse.
- Se en la mezo de vilaĝo oni trarigardas la fenestron aŭ pardon kaj vidas la monton *Garados* (Garadoŝ) tre proksima, tiam pluvos.
- Se somere la suno estas blinda (ne brilas), verŝajne pluvos dum longa tempo.
- Se nokte estas tre malvarma, morgaŭ la suno brilos varme.
- Se vi aŭdas tiel, ke la trajno trafikanta kvazaŭ envenas la domon, la vetero ŝanĝiĝos.
- Se la korpoparto reŭmatisma komencas dolori, atendu malbonan veteron, pluvon, venton, neĝon.
- Se la oreloj de iu tre jukas, la vetero ŝanĝiĝas alloge pluvon, neĝon.
- Se la dorso de iu tre jukas vintre, neĝo venas.
- Se la loko de operacio doloras, pluvo, neĝo venas.
- Se la floroj printempaj kaj la fruktoarboj refoje burĝonas aŭtune, estos longa aŭtuno.

- Se la kalao (*zantedeschia*) ploras (akvogutoj ekaperas sur ĝi), pluvo estos.
- Se sur la plej juna folio la filodendrono akvogutoj ekaperas, pluvo venas.
- Se la petalo de kalendulo kuntiriĝas matene, ĉitage verŝajne pluvo estos.
- Se sur la floro bergenio akvoguto ekaperas, pluvo venas.
- Se la pinto de glacifloro malsekiĝas, pluvo estos.
- Se la fumo malsupreniĝas, malbona vetero venas.
- Se la „pugo“ (malsupro) de kaldroneto ĵetas fajrerojn, prenite tiu desur la fajro, verŝajne pluvo estos.
- Se la fajro tre krakas, tre malvarma vetero estos.
- Se la pajloĉapelo krakas, verŝajne pluvo venos.
- Se la salo malsekiĝas en la domo, pluvo estos.
- Se la araneaj retoj flugadas proksime al la ternivelo, longa aŭtuno estos.
- Se vintre la akvo elfluas sur la glacion, la vetero fluiĝos (mildiĝos).
- Se vintre la akvo en rivero elfluas sur la glacion, neĝos.
- En decembro, je porkobuĉado oni observu, kiel situas la lieno en la porko. Se ties pli dika flanko estas al kapo, la pli grava parto de la vintro jam estas for, se la pli dika flanko montras al vosto, en tiu okazo la pli grava parto de la vintro ankoraŭ venos.
- Se vintre pluvos, somere verŝajne inundoj estos.
- Vintre, kien akvo venas, tie ankaŭ somere fluas.